

Ronald Cecil GATES

BRIÛO KUN VENENO



FEL

Brîgo kun veneno

Ronald Cecil Gates

Brîgo kun veneno

Eldono de Flandra Esperanto-Ligo

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono de la kompleta verko. Ĝi rajtas esti kopiita kaj disdonata laŭplaĉe kaj senkoste.

ANTAŬPAROLO

Tiu ĉi rakonto, lokita en kampara urbo en Aŭstralio, estas la kvina en serio da murdenigmoj, en kiuj ĉefrolas detektivkomisaro Roberto Elis kaj universitata gardisto Petro Tomson. Temas ĉifoje pri hommortigo okazinta dum kunveno de la loka briĝa klubo. La viktimo estas la prezidanto de la klubo kaj profesoro pri filozofio en la universitato.

La aŭtoro deziras agnoski la konsilon malavare donitan de doktoro Ralph Harry, emerita diplomato kaj eksa prezidanto de Aŭstralia Esperanto-Asocio. Aparte menciindas ĉirilate lia kvinlingva (en Esperanto kaj la angla, la franca, la germana kaj la itala) briĝa terminaro, kies kompilado bedaŭrinde restis nefinita ĉe lia morto en la jaro 2002.

Verkante ĉi tiun rakonton, la aŭtoro penis eviti novradikojn, uzante anstataŭe la vastan eblon, kiun posedas Esperanto, de vortfarado el relative malmulte da elementoj. Multe helpis tiurilate la retpaĝaro www.bonalingvo.org.

PERSONARO

Lucia Avakian: Edzino de Olivero

Olivero Avakian: Lektoro pri ĥemio

Natano Botril: Profesoro pri filozofio

Hilda Davenport: Lektorino pri matematiko

Amelia Elis: Edzino de Roberto

Roberto Elis: Polica komisaro

Frederiko Ĝirard: Administranto de eksarmeana klubo

Vinifreda Hagen: Fondintino de briĝa klubo

Adriano Inglis: Profesoro pri filozofio

Elizabeta Inglis: Edzino de Adriano

Ĉarlota Mikaeli: Malriĉiĝinta grafino

Diana Simkin: Lektorino pri matematiko

Mateo Skolnik: Kuracisto

Milicenta Tobin: Membro de briĝa klubo

Dorotea Tomson: Edzino de Petro

Petro Tomson: Ano de universitata sekuriga servo

Norma Vanden: Esplorasistantino al Olivero Avakian

La personoj kaj okazaĵoj en tiu ĉi romano estas tute fikciaj.

1. ALVOKO AL LA KLUBO

“Roĉjo! Vi devas tuj veni. Iu ĵus mortis.... Nia prezidanto, profesoro Inglis.... Nu, doktoro Skolnik opinias, ke de veneno.... Jes! Ĉe la klubo. En la ludoĉambro. Mi telefonas de la oficejo.... Kion?... Ankoraŭ ne! Ĉu mi alvoku ilin?... Bone!... Jes! Kiom mi scias, ili ĉiuj ankoraŭ restas en la ĉambro.... Konsentite! Mi provos reteni ilin. Sed rapide, mi petas!”

Respondinte, ke li tuj ekveturos, detektivkomisaro Roberto Elis demetis la aparaton. Ĵetinte bedaŭran rigardon al la libro, de kiu post la vespermanĝo li rekomencis la legadon, li surmetis en la dormoĉambro sian jakon kaj rapidis al la aŭtoremizo.

La ĵusa telefoninto estis lia edzino, Amelia. Ŝi aniĝis al la briĝa klubo de Longvalo antaŭ nur du monatoj, sed ŝi jam akiris la respekton de la kunludantoj pro sia afableco kaj sia kreskanta sperteco. La membroj kunvenadis ĉiun mardan vesperon kaj ĵaŭdan posttagmezon por tri-kvar horoj da duplikata briĝo. La konkursoj havis lokon en la luksa konstruaĵo de la eksarmeana klubo.

Kvankam Roberto Elis ĝuis de tempo al tempo societana briĝludadon, lia entuziasmo ne etendiĝis ĝis kutima partopreno en tiaj pli formalaj okazoj. Post tago da polica laboro li preferis malstreĉiĝi en sia hejma salono kun glaso da viskio kaj bona libro. Tiu, kies legadon li ĵus malvolonte forlasis, temis pri la esplorado de Pacifiko dum la lasta jarmilo. Eke de la unua ĉapitro ĝi plezure ekscitis lian imagopovon.

Necesis nur eta devojiro, por ke li vizitu la policejon. Tie li starigis sian aŭton en la strato apud la ĉefpordo. Sidis en la publika akceptejo, malantaŭ klaptablo, policano kaj policanino, ambaŭ en uniformo. Ĉe lia eniro ili ĉesigis sian konversacion kaj levis la kapon.

La komisaro parolis rapide. “Okazis ĉe la eksarmeana klubo subita morto, laŭŝajne pro veneno. Mi iras tien. Bonvolu telefoni al la ambulanca servo, por ke la kadavro estu transportita sen prokrasto al la malsanulejo! Kaj vi,” – li alparolis la uniformitinojn – “mi opinias dezirinde, ke vi akompanu min. La morto okazis dum kunveno de la loka briĝa klubo, kies membroj, laŭ mia kompreno, konsistas plejparte el virinoj. Ĉu vi estas preta nun ekiri?”

La policanino respondis, ke jes. Elis faris paŝon al la pordo, sed tuj sin returnis. “Ho! Ni bezonos fotilon. Ĉu ...?” Ne necesis daŭrigi, ĉar la uniformito malantaŭ la klaptabulo jam prenis la aparaton de sur breto kaj prezentis ĝin al la policanino.

Kiam Roberto Elis haltigis sian aŭton antaŭ la eksarmeana klubo, la horloĝo sur la panelo montris dek ok minutojn post la sepa. La suno ankoraŭ ne atingis la horizonton, kaj ĝiajn radiojn la ruĝbrunaj brikoj de la konstruaĵo resendis brile. Amelia Elis staris sur la trotuaro kune kun mezaĝa, kalviĝanta viro en griza kompleto. Ili venis antaŭen, dum la du policistoj eliĝis.

“Roĉjo,” Amelia diris, “permesu, ke mi prezentu sinjoron Frederiko Ĝirard. Li administras la eksarmeanan klubon.”

La du viroj manpremis. “Kia terura okazaĵo!” sinjoro Ĝirard rimarkigis per basa, preskaŭ funebra voĉo. “Neniam antaŭe mi spertis tian ...”

“Jes!” interrompis la detektivo malpacience. “Ĉu ni iru vidi la kadavron?”

“Kompreneble!” Ĝirard ĵetis rigardon al vico da fenestroj en la supra etaĝo. “Ĝi troviĝas en la ludoĉambro. Ankoraŭ atendas tie la membroj de la briĝa klubo.” Li ekpaŝis al la ĉefpordo.

“Momenton!” Elis vokis de malantaŭ li. “Devas baldaŭ alveni ambulanco. Ĉu iu povos ...?”

Sen halti aŭ turni la kapon, la administranto respondis, “Mi atentigos la pordiston.” Sekvate de la aliaj, li eniris la konstruaĵon kaj interŝanĝis plurajn vortojn kun uniformita viro, kiu staris malantaŭ akceptotablo. De la maldekstra flanko de la vestiblo larĝa, tapiŝita ŝtuparo kurbiĝis supren. Laŭ ĝi sinjoro Ĝirard antaŭiris.

La ludoĉambro estis longa kaj mallarĝa. Laŭ la dekstra flanko vico da fenestroj enlasis taglumon. La korpo de profesoro Inglis kuŝis sur la planko proksime de la pordo, apud la ekstremo de ligna tablo, sur kiu troviĝis fumanta akvohejtilo, kruĉo da lakto, bovletoj da sukero, da solveblaj kafopulvoro kaj da tesaketoj, kaj du teleroj surhavantaj biskvitojn. Estis tie ankaŭ malorda kolekto da tasegoj, pluraj el kiuj entenis trinkaĵon.

Interspacigitaj meze de la ĉambro staris sep faldeblaj ludotabloj, sur ĉiu el

kiuj estis videbla staketo da plataj ortangulaj objektoj el flava plasto. El la seĝoj ĉirkaŭ la tabloj nur unu, ĉe la fundo de la ĉambro, estis okupata. Sur ĝi sidis, kun kuseno ĉe la dorso, mezaĝa virino. Inter la tabloj kaj la kadavro staris grupo de ĉirkaŭ dudek kvin homoj, nur pluraj el kiuj konversaciis.

Ĉe la eniro de la kvaropo, malaltkreska diketa viro portanta senrandajn okulvitrojn sin apartigis kaj venis antaŭen. La ceteraj atendantoj sekvis lin per la rigardo.

Diris Amelia Elis al sia edzo, “Tiu ĉi estas mia partnero, doktoro Mateo Skolnik. Li estas ankaŭ la vicprezidanto de la klubo.” Kaj, al la kuracisto, “Permesu min prezenti mian edzon, detektivkomisaron Elis.”

Doktoro Skolnik etendis manon, samtempe dirante, “Mi jam konas vin laŭ reputacio.”

La detektivo permesis al si rideton. “Favore, mi esperas.” Li ĵetis rigardon al la kadavro, antaŭ ol daŭrigi, “Nu, kion vi povas sciigi al mi pri tio, kio okazis?”

“Malmulton. Mi ne vidis Adrianon fali. Tamen mi tuj poste ekzamenis lin. Li estis jam mortinta. La indikoj forte sugestis veneniĝon. Tiun opinion mi esprimis al la ĉirkaŭstarantoj, kaj via edzino decidis iri telefoni al vi.”

“Hm! Nu, mi esperas, ke ni baldaŭ havos konfirmon aŭ neon de via diagnozo. Mi jam vokigis ambulanco por forporti la mortinton al la malsanulejo, kie oni faros nekropsion.” Li refoje ekrigardis la kadavron. “Ĉu iu jam sciigis la parencojn?” li demandis.

La kuracisto skuis la kapon. “Ne! Mi ne pensis pri tio.” Li hezitis. “Mi iomete konas lian edzinon, Elizabetan, malgraŭ ke ŝi kaj Adriano ne estas klientoj miaj. Ĉu vi deziras, ke mi telefonu al ŝi?”

Je tiu malagrabra tuja tasko la detektivo bonvenigis la oportunon senigi sin. Li respondis, “Jes, se vi bonvolos. Vi povos informi ŝin, ke mi vizitos ŝin morgaŭ, kaj ke la korpo baldaŭ troviĝos en la kadavrejo ĉe la malsanulejo, se ŝi deziros tuj vidi ĝin.”

“Bone!” doktoro Skolnik konsentis, kaj faris paŝon en la direkto al la pordo.

“Momenton!” Elis indikis per la mano tason, kiu kuŝis sur la tapiŝo apud la

kadavro. “Ŝajnas, ke li estis trinkanta teon aŭ kafon.”

“Jes!” la kuracisto respondis. “Mi jam rimarkis la tason. Mi supozas, ke ĝi estas lia, sed ...” Li lasis nefinita la frazon kaj turnis la okulojn al la virino sidanta ĉe la plej distanca briĝa tablo. “Okazis ia laŭta disputo, kaj mia atento direktiĝis tien. Same, mi konjektas, estis altirita la atento de la aliaj membroj.”

“Kia disputo?” Elis demandis.

Doktoro Skolnik tusetis kaj mienis malkomforte. “Pri sidloko,” li diris, kaj kunpremis la lipojn.

Intervenis Amelia Elis. “Mi povas klarigi. Sinjorino Tobin ĉiam insistas, ke ŝi sidu ĉe tiu fora tablo – tiu, ĉe kiu ŝi nun troviĝas. Ĝi situas plej malproksime de la klimatiza aperturo. Ŝi plendadas pri doloriga dorso. Kaj ŝi postulas ĉe tiu tablo la nordan sidlokon, por ke ŝi ne devu cirkuli, kiam tion faras la orientaj-okcidentaj duopoj. Mi ne scias, ĉu vi ...”

“Jes, mi pensas, ke mi komprenas,” interrompis ŝia edzo. “Sed kio pri la disputo?”

“Nu, ŝajnas, ke eksidis sur la koncerna seĝo nova membro de la klubo, kiu ne sciis pri la indulgo, kiun Milicenta Tobin ĝuas. Altiris mian atenton laŭtigita voĉo, kaj mi vidis Milicentan provi formovi la kulpulinon per mano sur la brako. Lucia Avakian iris apartigi ilin, kaj klarigis la situacion al la novalveninto. Milicenta ĵus prenis sian kutiman seĝon, kiam profesoro Inglis falis. Doktoro Skolnik ekzamenis lin kaj informis nin, ke li estas mortinta, ŝajne pro venenado.”

Roberto Elis dankis sian edzinon kaj turnis sin al la kuracisto. “Ĉu la kadavro ankoraŭ kuŝas, kiel tuj post la falo?”

Doktoro Skolnik respondis, ke jes.

“Kaj tiu taso?”

“Ankaŭ ĝi.”

“Bone! Ni devas fari fotojn.” Li kondukis sian edzinon kaj la kuraciston iom malproksimen kaj per gesto invitis la policaninon uzi la aparaton. Tion ŝi faris.

Poste la komisaro sin klinis por preni de sur la planko la tason. La tapiŝo ĉirkaŭ ĝi estis miskolorita de humida makulo, sed restis ankoraŭ en la fundo malgranda kvanto da likvaĵo. La detektivo flaris. “Kafo,” li diris, kaj transdonis la tason al sia koleginino, petante, ke ŝi ne perdu la enhavon.

La kuracisto tusetis. “Mi nun iros telefoni.”

El la grupo ĉe la malantaŭo de la ĉambro alpaŝis virino. Amelia tuŝis la brakon de sia edzo. “Sinjorino Vinifreda Hagen,” ŝi klarigis. “Ŝi fondis la briĝan klubon antaŭ multaj jaroj. Ŝi estis direktanta la ĉivesperan ludadon.”

Roberto Elis faris paŝon antaŭen, preta prezenti sin. Parolis tamen la unua la virino. “Ĉu ni povas foriri? Kompreneble ni forlasos la konkurson.”

La detektivo rigardis ŝin. Ŝi aĝis eble sepdek jarojn. Ŝiaj grizaj haroj estis plektitaj en tubero ĉe la nuko. Ŝian malaltkreskecon pliigis kurba dorso. Tamen ŝiaj sinteno kaj parolmaniero sugestis, ke ŝi kutimas ordoni pli ofte ol submetiĝi.

Ne ricevinte tujan respondon, ŝi ripetis la demandon. “Nu? Ĉu ni rajtas foriri?”

Elis malrapide skuis la kapon. “Mi bedaŭras, ke provizore ne,” li diris. “Estas mia devo fari enketon pri la morto. Mi bezonos paroli kun ĉiu el la ĉeestantoj.” Li turnis sin al la administranto de la eksarmeana klubo, kiu ĝis tiam, starante iom aparte, rigardadis la faraĵojn kun maltrankvila, eble malaproba, esprimo sur la vizaĝo. “Ĉu vi povas disponigi al mi lokon, kie eblos konduki intervjuojn sen interrompo?”

Per sia basa, malgaja voĉo sinjoro Ĝirard respondis, “Vi povas uzi mian kabineton. Ĉu vi deziras tien iri nun?”

Aŭdiĝis frapo sur la malfermita pordo de la ludoĉambro, kaj envenis du blankuniformitaj viroj, unu el kiuj portis faldeblan brankardon.

“Baldaŭ,” Elis respondis al la administranto. “Bonvolu atendi momenteton!” Li iris renkonte al la alvenintoj kaj interŝanĝis kun ili kelkajn vortojn. Ili kovris per griza tuko la kadavron kaj ĝin levis sur la brankardon. Post plua mallonga konversacio ili foriris kun sia ŝarĝo.

Komisaro Elis alparolis sinjoron Ĝirard. “Nun ni povas iri.” Li direktis la

rigardon al la kurbdorsa virino. “Vi estas sinjorino Hagen, ĉu ne?”

Per abrupta voĉo ŝi respondis, “Jes!”

“Nu, se vi bonvolos akompani min la unua, vi povos ankaŭ la unua foriri.” Li sin turnis al la policanino. “Restu vi ĉi tie kaj informu la aliajn, ke mi deziras paroli kun ili unuope!”

Frederiko Ĝirard kondukis la komisaron kaj la brigokluban fondintinon en malordan oficejon, kie juna virino laboris ĉe skribmaŝino. Sen alparoli ŝin, li malfermis internan pordon, palpis por trovi la ŝaltilon de la plafona lampo, kaj sin movis flanken, por ke la aliaj eniru.

La kontrasto kun la ĉambro, kiun ili ĵus trapasis, ne povus esti pli frapanta. Dum tiu aspektis kiel provizora deponejo, kun kartonaj skatoloj kaj stakoj da paperoj dismetitaj sur la planko, la kabineto de la administranto pli similis la konsultejon de prospera kuracisto aŭ juristo. Krom ledtegitaj skribotablo kaj tri luksaj foteloj, troviĝis apud unu muro polurita ligna bufedo kun vitraj pordoj, tra kiuj estis videbla kolekto da boteloj kaj glasoj. Ekster la larĝa fenestro arbofolioj ore rebrilis la lastajn radiojn de la subiranta suno.

Diris sinjoro Ĝirard, “Mi lasos vin ĉe via laboro. Se vi bezonos ion, ne hezitu peti al mia sekretariino en la ekstera oficejo! Ŝi laboros tie ĝis la naŭa. Min vi trovos, se necese, en la aŭditorio en la tera etaĝo. Tie eke de la oka komediisto el Somerholmo prezentos serion da skeĉoj.” Li mienis malŝate. “Ne multe plaĉas al mi tia distraĵo. Tamen mi devos ĉeesti por certigi, ke bone funkcias la lumoj kaj la laŭparolila sistemo.” Li eliris, fermante post si la pordon.

2. LA FONDINTINO

Komisaro Elis per la mano montris al sinjorino Hagen fotelon, kaj mem sidiĝis sur alia. Li prenis el poŝo notlibron kaj globskribilon kaj estis konsideranta, kiel iniciati la pridemandadon, kiam parolis la virino. “Kion vi deziras ekscii?”

Li kuntiris la brovojn. “Ĉion,” li respondis, “kio okazis, antaŭ ol mortis la profesoro. Ŝajnas, ke li estis venenita. Do gravas”

Ŝi interrompis lin. “Tiel diris doktoro Skolnik.” En ŝia vizaĝa esprimo la detektivo perceptis malestimon.

“Ĝuste!” li rimarkigis. “Kompreneble, necesos atendi la rezulton de la nekropsio por esti certa. Tamen intertempe mi devas agi laŭ tiu supozo.” Li rigardis ŝin en la okulojn. “Je kioma horo vi alvenis al la ludoĉambro?”

“Je iom post la sesa kaj duono. La marda ludado devus komenciĝi akurate je la sepa, kvankam tio malofte efektiviĝas. Estis mia vico direkti la konkurson, pro kio mi venis frue por kontroli la tablojn kaj distribui la mantabuletojn kaj la aliajn necesajojn.”

“Tabuletojn?”

Ŝi rigardis lin iom da tempo sen paroli. Fine ŝi demandis, “Ĉu vi neniam ludis duplikatan briĝon?”

La detektivo malrapide kapneis.

“Nu,” la virino daŭrigis, “en ĝia plej simpla formo ĝi estas speco de konkurso inter duopoj, kun apartaj rezultoj por la nordaj-sudaj duopoj kaj la orientaj-okcidentaj. La nordaj-sudaj duopoj ĉiuj ludas, unu post alia, la samajn parojn da manoj; kaj simile la orientaj-okcidentaj duopoj ĉiuj ludas la aliajn parojn. Tiel ne influas la rezultojn la hazardo de la disdono. Ĉu tio estas klara?”

“Mi pensas, ke jes. Tamen ne estas necese”

Sed sinjorino Hagen ne permesis al li bridri la vortofluon. Interrompante lin,

ŝi daŭrigis, “Antaŭ la komenco de la ludado, la partoprenantoj miksas kaj disdonas en kvar manojn ĉiun el la kartaroj, kiuj atendas ilin ĉe ilia tablo, kaj enmetas la manojn el ĉiu disdono en kvar poŝojn en plasta tabuleto. Do, kiam la ludado komenciĝas, troviĝas sur ĉiu tablo eble du tabuletoj, eble tri aŭ pli, depende de la elektita movado; kaj por ludi disdonon, la konkursantaj duopoj prenas siajn manojn el la poŝoj de la tabuleto, kaj post la ludo ili remetas ilin.”

Ŝi paŭzis kaj mallonge rigardis la detektivon, kvazaŭ por certiĝi, ke li ankoraŭ sekvas la klarigon. Tamen, antaŭ ol li povus krei, “Sufiĉe!”, la fluo rekomenciĝis. “Kiam ĉiu kvaropo jam ludis sian komencan aron da disdonoj, la direktanto signalas la movon, kaj ĉiu orienta-okcidenta duopo antaŭeniras al la sekva tablo por konkuri kontraŭ nova norda-suda duopo. Samtempe ĉiu norda-suda duopo transdonas la tabuletojn, kiujn ĝi ĵus ludis, al la malsekva tablo.”

Dum la tuta klarigo, sinjorino Hagen akompanis siajn vortojn per abundo da gestoj. Nun ŝi metis la manojn sur la genuojn kaj demandis, “Ĉu vi nun komprenas?”

Ŝia parolmaniero memorigis Elis-on pri pedanta instruistino en lernejo. Tamen li aljuĝis al ŝi plenan poentaron pro detaleco. “Sufiĉe, dankon!” li respondis, kaj paŭzis, kvazaŭ li reorientas sin, antaŭ ol demandi, “Ĉu jam ĉeestis iu alia, kiam vi alvenis al la ludoĉambro?”

“Jes! Jam trinkantis kafon aŭ teon Ĉarlota Mikaeli kaj Diana Simkin. Mi salutis ilin sed ni ne konversaciis. Mi devis prepari la tablojn. Krome, mi ne ŝatas tiun Mikaeli-on. Ŝi pretendas esti vidviniĝinta grafino, sed ŝi kondutas tute sengracie. Kaj ŝi parazitadas, laŭŝajne senhonte.” Fine rimarkinte la esprimon de malpacienco sur la vizaĝo de la detektivo, ŝi ĉesis paroli.

“Kaj poste?” sufloris Elis.

“Alvenis unuope kaj duope aliaj membroj, ĝis ni estis dudek kvar. Tio implicas ses ludotablojn, sed mi lasis stari provizore la sepan. Ofte okazas, ke iuj nezorgemuloj alvenas malfrue. Kun nur ses tabloj la movado de la duopoj kaj la tabuletoj estas iom komplika, kaj la direktanto devas zorgi, por ke nespertuloj ne faru erarojn. Feliĉe ĉifoje venis plua duopo, do ni havis ses tablojn kaj duonon, kies aranĝo ne prezentas malfacilaĵojn.”

“Kie troviĝis la ĉeestantoj dum la periodo de pluraj minutoj, antaŭ ol profesoro Inglis falis?”

“Mi pensu!” Ŝi momente fermis la okulojn. “Ĉirkaŭ kvin-ses el ni staris proksime de la trinkaĵa tablo. El la ceteraj, pluraj interparoladis, starante apud la ludotabloj, sed la plejmulto jam sidiĝis. Estis tio la kaŭzo de la embaraso.”

La komisaro ŝajnis nekomprenon. “Embaraso?” li demandis.

“Jes! Milicenta Tobin ekscitiĝis pro tio, ke iu sidas sur ŝia kutima seĝo.” Aperis sur la vizaĝo de la maljunulino esprimo de malŝato. “Ŝi estas plendemulino. Oni antaŭ longe lernis ignori ŝiajn grumblojn. Tamen ĉiokaze ŝi kriis tre laŭte kaj metis manon sur la ofendanton. Lucia Avakian iris kvietigi ŝin, kaj en tio sukcesis. Milicenta ĵus ekokupis sian kutiman lokon, kiam mi rimarkis, ke profesoro Inglis kuŝas sur la planko.”

“Ĉu vi ne vidis lin fali?”

“Ne! Sed mi pensas, ke mi aŭdis la sonon de la falo kaj pro tio turnis min.”

“Kie vi tiam troviĝis?”

“Mi komencis sekvi sinjorinon Avakian, post kiam ŝi ekiris en la direkto al la disputo. Ŝi estis alveninta al la klubo nur tri-kvar minutojn antaŭe kaj, dum ŝi verŝis al si tason da kafo, ni pridiskutis niajn konvenciojn rilate al anoncado, ĉar ni nur hieraŭ aranĝis kunpartneri la unuan fojon en la ĉivespera konkurso.”

Per la lango ŝi malseketigis al si la lipojn, antaŭ ol daŭrigi, “En pli grandaj kluboj, precipe en la metropolo, la direktanto ne prenas parton en la ludado. Ni ne havas la rimedojn por pagi direktanton, escepte de kiam ni starigas pli formalan konkurson, al kiu invitas homoj el aliaj kluboj. Do normale ni dividas la taskon laŭvice inter tiuj el ni, kiuj estas kvalifikitaj, kaj la respondeculo ankaŭ ludas. Tiun rolon mi plenumas pli ofte ol ...”

Elis haltigis la vortfluon per levita mano. “Jes! Interese!” li diris. “Sed ni reiru al tio, kio okazis, antaŭ ol la profesoro falis! Ĉu ankaŭ li ne ekiris pacigi la kverelon, konsidere, ke li estis la prezidanto de la klubo?”

La virino snufis. “Ne li,” ŝi eligis. “Gravis al li nur liaj propraj interesoj. Kiam oni proponis lin por la ofico en la antaŭnelonga elektado, mi maltrankviliĝis pri la farto de la klubo sub lia prezidado.”

Roberto Elis ĵetis al ŝi scivolan rigardon. “Do,” li rimarkigis, “vi malmulte

estimis lin, ĉu?”

Ŝi silentis, kun la lipoj kunpremitaj.

La detektivo decidis, ke tiu temo indas postan esploron. Antaŭe, tamen, estis la tempo sekvi alian vojon. “Ŝajnas,” li diris, “ke la profesoro trinkis kafon tuj antaŭ sia morto, kaj estas almenaŭ eble, se ne probable, ke en ĝi troviĝis ia tokso.”

SinJORINO Hagen malrapide kapkonsentis. “Jes! Tion mi jam konjektis. Sed kiel ...?” Ŝi momente levis la manplatojn. “Probable preskaŭ duono de ni kutime trinkas kafon, inkluzive de mi.”

“Nu,” Elis diris, “tio devas resti nura hipotezo, ĝis analizo de la restaĵoj, kiujn ni trovis en lia taso. Tamen” – li atente rigardis ŝin en la okulojn – “estas prudente eĉ nun konsideri la eblecon, ke iu intence enmetis en lian tason ian mortigan substancon. Ĉu vi povas diri, kiu havis la oportunon tion fari?”

Ŝi hezitis, kuntirante la brovojn, antaŭ ol skui la kapon. “Ne! Mi bedaŭras, ke ne. Mi pensas, ke la profesoro staris tuj malantaŭ mi, kiam mi komencis konversacii kun Lucia. Sed certe estis kelkaj aliaj tute proksime. Se li demetis sian tason sur la tablon, post kiam ekplendis Milicenta Tobin ...” Ŝi lasis la frazon nefinita.

“Ĉu vi volas diri, ke, dum ĉiuj direktis sian atenton al la disputo, iu povis ...?”

“Ĝuste! Sed kiu, mi ne scias. Certe nek mi nek Lucia Avakian, ĉar ŝi tuj iris pacigi Milicentan kaj mi sekvis ŝin. Bedaŭrinde mi ne rimarkis, kiu cetere apudestis al la tablo.”

“Hm!” Elis skribis du-tri liniojn en sia notlibreto. Li turnis la okulojn al la fenestro. Jam regis ekstere nokta mallumo, tra kiu briletis malabundaj stratlampoj el la dekliva norda kvartalo de la urbo. Li refoje rigardis la virinon. “Vi jam komprenigis al mi,” li diris, “ke vi ne alte taksis profesoron Inglis, ĉu ne? Ĉu, laŭ via scio, ekzistas aliaj, kiuj pli intense malamamis lin?”

Ŝi mienis singarde. “Eble. Pri liaj privataj rilatoj mi ne estas informita.”

La komisararo persistis. “Sed ene de la klubo. Vi sendube havis okazon

rimarki, ĉu li estas populara aŭ ne.”

Ŝi grimacis. “Populara? Ah!”

“Sed li estis elektita kiel prezidanto.” Li hezitis. “Ĉu sin prezentis aliaj kandidatoj?”

Ŝi ĵetis rigardon al li kaj klinis la kapon. “Mi,” ŝi diris. Post paŭzo ŝi levis la okulojn kaj per iom pasia tono daŭrigis, “Mi, kiu fondis la klubon kaj dum jardekoj servis kaj prizorgis ĝin. Ho! Li estis populara ĉe iuj membroj. Sed nur pere de flatado kaj mi ne scias kio cetera. Li estas fifama pro sia konduto rilate la alian sekson. Mi ne komprenas, kiel lia kompatinda edzino toleris lian virinumadon.”

“Interese!” rimarkigis la policano. Li skribis noton. “Do,” li daŭrigis, “la profesoro adultadis. Ĉu kun membrinoj de la klubo?”

SinJORINO Hagen ne tuj respondis. Sur ŝiaj genuoj la manoj interplektiĝadis, kaj ilin ŝi rigardis. Fine ŝi parolis. “Mi ne kutimas klaĉi. Tamen mi komprenas, ke estas ...” Ŝi hezitis kaj kuntiris la brovojn.

Elis atendis pacience iom da tempo, antaŭ ol milde diri, “Vi komprenas – ĉu ne? – ke, se iu ja intence mortigis la profesoron, estas via devo doni al la polico ĉiun ajn informon, kiu povas havi rilaton al la afero.”

Ŝi malrapide kapjesis sed daŭre silentis.

“Nu,” la detektivo demandis, “kion vi povas sciigi al mi?”

Ŝi malseketigis siajn lipojn. “Temas pri konfidenco farita al mi de amikino, kiu estas membro de la klubo. Se ŝi ekscius, ke mi rivelis ...”

“Vi povas fidi al mia diskreteco.”

Ŝi faris decidon. Per pli firma voĉo ŝi diris, “La koncerna persono estas Hilda Davenport. Ŝi instruas pri matematiko en la universitato. Dum du-tri monatoj ŝi engaĝiĝis en sekretan amaferon kun Adriano Inglis. Kiam ŝi eltrovis, ke ŝi estas nur unu inter pluraj, ŝi rompis la rilaton kaj baldaŭ poste eniris en aferon kun iu Olivero Avakian, kiu lektoras en la universitato. Ankaŭ li estas edzigit: fakte, li estas la edzo ĝuste de mia partnero por la ĉivespera konkurso. Nu, bone! La

moralo de homoj estas propra afero, kvankam certe mia edzo, dum li vivis, neniam perfidis min. Tamen, kiam temas pri minacoj” Ŝi mienis indigne.

“Minacoj faritaj de kiu?” Elis demandis.

“De profesoro Inglis.” Ŝi paŭzis, kvazaŭ ŝi ordigis al si la pensojn.

Daŭrigante, ŝi diris, “Pri tio ĉio mi sciis nenion, ĝis la antaŭlasta ĵaŭdo. Mi tiam partneris kun Hilda en la posttagmeza konkurso. Ŝi ludis nekutime mallerte. Estis evidente, ke io ege maltrankviligas ŝin. Pro tio, ke ŝi estas amikino, mi ne atentigis ŝin pri ŝiaj eraroj. Poste, tamen, dum ni eliris al niaj aŭtoj, ŝi petis mian pardonon. ‘Mi troviĝas en terura embaraso,’ ŝi diris, kaj ekploris.

“Mi invitis ŝin al mia domo por trinkaĵo. Tie ŝi rakontis al mi la tutan historion. Ŝajnas, ke Inglis iel eksciis pri la nova amafero inter ŝi kaj Olivero Avakian kaj minacis, ke li informos ties edzinon – tio estas Lucia – se Hilda ne rekomencos la antaŭan rilaton kun li mem. Ŝi ne sciis, kion fari. Bedaŭrinde mi trovis nenian konsilon utilan por doni al ŝi. Mi povis nur simpatii kun ŝi.” Ŝi kliniĝis retroen sur la fotelo. “Tio estas ĉio,” ŝi findiris.

“Kaj sufiĉa,” rimarkigis la detektivo. “Do estas almenaŭ unu persono, kiu laŭŝajne bonvenigas la morton de profesoro Inglis.”

SinJORINO Hagen levis maltrankvile la manojn. “Ne miskomprenu, mi petas! Estas neeble, ke Hilda Davenport iel implikiĝas en murdo. Ŝi ne kapablas fari malbonon al muŝo. Mi celis nur informi vin pri la karaktero de la profesoro. Devas esti aliaj personoj, kiuj simile havis tialon por malamegi lin. Mia opinio, vi devas fari enketojn en la universitato.”

Komisaro Elis malrapide skuis la kapon. “Se li ja mortis pro venenado,” li diris, “estas preskaŭ eksterdube, ke la kulpulo troviĝas inter tiuj, kiuj nun atendas en la ludoĉambro.” Li fermis sian notlibron. “Se vi havas nenion ceteran por sciigi al mi, mi povas lasi vin foriri. Dankon pro via helpo!” Li stariĝis, antaŭ ol aldoni, “Kaj pro via malkaŝemo.”

Li iris malfermi al ŝi la pardonon.

3. MALMULTO DA INFORMO

Restante sola en la kabineto de la administranto, Roberto Elis rigardis sian brakhorloĝon. Ĝi indikis preskaŭ dek kvin minutojn post la oka. Li trairis la eksteran oficejon, kie ankoraŭ laboris ĉe la tajpilo la sekretariino, kaj direktis siajn paŝojn al la ludoĉambro.

Lia edzino kaj la policanino staris apud la trinkaĵa tablo, konversaciante. Sinjorino Hagen estis ŝlosanta ĉemuran lignan ŝrankon, kaj post la apero de la detektivo ŝi paŝis el la ĉambro sen vorton diri. La ceteraj dudek unu homoj aŭ sidis ĉe la ludotabloj, aŭ staris apude. Kvankam la akvohejtilo ankoraŭ vaporis, kaj kvankam restis sur la trinkaĵa tablo provizon da biskvitoj, neniu el la ĉeestantoj kunhavis tason aŭ manĝis.

Post unu-du minutoj, doktoro Skolnik stariĝis kaj venis antaŭen. “Elizabeta Inglis troviĝas hejme,” li sciigis al la detektivo. “Ŝi ricevis la novaĵon kun surpriza manko de emocio. Ŝi ne volas vidi la kadavron. Pro tio, ke ŝi estas sola en la domo, mi konsilis, ke ŝi petu al iu parenco aŭ najbarino sidi kun ŝi. Mi ankaŭ proponis, ke mi mem alportu trankviligaĵon, se tian ŝi ne havas ĉe la mano. Tion ĉion ŝi rifuzis, asertante, ke ŝi ne bezonas helpon.”

“Dankon! Vi faris vian eblon. Mi iros vidi ŝin morgaŭ. Mi esperas, ke ŝi povos ĵeti lumon” Lia parolo cedis al cerbumado.

La kuracisto momente turnis siajn okulojn al la grupoj ĉirkaŭ la tabloj. “Kiom da tempo ni devos resti ĉi tie?” li demandis. “Neniu inklinas ludi kartojn. Ni ĉiuj deziras foriri hejmen.”

Elis ĵetis rigardon al la atendantoj, kies okuloj senescepte direktatis al li. “Hm!” li diris. “Mi intencis intervjui ilin unu post alia. Tamen mi ne deziras deteni ilin pli longe, ol necese. Eble, por plirapidigi la aferon, sufiĉos provizore pridemandi ilin kolektive. Se montriĝos, ke iuj el ili havas informon plu sekvindan” Li lasis nefinita la frazon, kaj eltiris siajn notlibreton kaj globskribilon. Rigardinte laŭvice sian edzinon kaj la mediciniston, li petis al ili, “Ĉu vi bonvolos preni seĝon kun la aliaj?”

Dum li paŝis pli proksimen al la grupoj, du-tri el la klubanoj turnis siajn

seĝojn por pli facile vidi lin.

Starante plurajn metrojn for, “Gesinjoroj,” li diris, “mi nomiĝas Roberto Elis, detektivkomisaro. Estas mia devo enketi pri la morto de profesoro Inglis. Kiel vi eble jam scias, estas probable, ke kaŭzis ĝin ia veneno. Laŭŝajne li estis trinkanta kafon. Ĉu ankaŭ iuj el vi prenis kafon?”

Leviĝis ok-naŭ manoj, inkluzive de tiu de Amelia, kaj aliaj membroj balancis la kapon.

“Hm!” Elis ĵetis rigardon al la trinkaĵa tablo. “Do,” li daŭrigis, “evidentas, ke troviĝas nenio noca en la kafopulvoro.” Li paŭzis kelkajn sekundojn, kuntirante la brovojn, antaŭ ol demandi, “Ĉu iu el vi vidis la profesoron prepari al si la kafon?”

Sekvis silento, kvankam pluraj el la ĉeestantoj kapneis.

“Ĉu neniu troviĝis proksime de li? Ĉu li ne konversaciis kun iu el vi?”

Ankoraŭ silento. Ĝin rompis doktoro Skolnik. “Li alvenis preskaŭ la lasta. Mi rimarkis lian eniron sed ne tion, kion li poste faris. Kiel la aliaj, mi jam prenis trinkaĵon kaj biskviton kaj forlasis la tablon. Tamen, se mi devus konjekti, mi dirus, ke li restis sola ĉe la ekstremo de la tablo, apud la pordo.”

“Mi povas konfirmi tion,” volontis virino per mallaŭta voĉo.

La komisaro turnis la rigardon al ŝi. Ŝi havis la brakon duonlevita. Sur ŝia frunto kaj sub la okuloj troviĝis sulketoj kaj en ŝiaj kaŝtankoloraj haroj videblis grizaj strioj. Ŝi estis vestita per maleleganta trikota robo. “Kiel vi nomiĝas?” Elis demandis.

“Lucia Avakian.”

“Kion vi vidis?”

Ŝia embaraso estis evidenta. Ekrigardinte dekstren kaj maldekstren, ŝi hezite respondis, “Kiam mi alvenis, jam ĉeestis multaj aliaj membroj, inkluzive de profesoro Inglis. Li ja staris proksime de la pordo. Li havis tason enmane. Preter li, apud la trinkaĵa tablo, mi vidis mian partneron por la vespero, sinjorinon Hagen. Mi iris paroli kun ŝi kaj verŝi al mi kafon.”

“Kaj poste?”

SinJORINO Avakian Ĵetis rigardon al la virino, kiu sidis apud ŝi. “Okazis miskompreno inter mia amikino, sinJORINO Tobin, kaj alia ludonto. Mi iris helpi solvi ĝin. Tion ni Ĵus faris, kiam mi aŭdis ŝveladon de murmuroj malantaŭ mi. Turninte min, mi rimarkis, ke profesoro Inglis kuŝas sur la planko.” Ŝi klinis sin retroen kontraŭ la seĝodorson, kvazaŭ ŝi Ĵus plenumus penigan taskon.

“Dankon!” la detektivo diris. “Do ni scias, ke profesoro Inglis staris sola apud la tablo, trinkante kafon. Kaj poste, kio? Ĉu iu el vi vidis lin fali?”

Regis silento. Elis rigardetis sian poĴnhorloĝon. Ĝi montris jam preskaŭ la okan kaj kvardek minutojn. “Bone!” li anoncis. “Mi nun lasos vin foriri. Tamen mi bezonos liston de viaj nomoj, hejmadresoj, kaj se eble telefonnumeroj. Tiujn bonvolu doni al mia kolegino, antaŭ ol vi eliros!”

La policistino iris atendi apud la trinkaĵa tablo kaj la briĝoklubanoj komencis formi starvicon antaŭ ŝi. Dume Amelia kaj doktoro Skolnik venis al la detektivo. “Kiam vi ekhavas raporton el de la malsanulejo?” la medicinisto demandis.

“Pri la nekropsio, mi esperas, ke morgaŭ, malfrue en la antaŭtagmezo. Pri la analizo de la kafo, dependas de la aranĝoj pri specialistoj en la laboratorio.”

“Ĉu vi bonvolos sciigi al mi la rezulton de la nekropsio? Vi trovos min ĉe mia konsultejo eke de la naŭa kaj duono. Kaj plaĉos al mi ricevi postan informon pri la evoluado de la kazo, se tio eblos.”

“Certe! Kaj dankon pro via helpo!”

“Ne menciinde. Estas bonŝance, ke via edzino hieraŭ telefonis al mi por demandi, ĉu mi volontos ludi kun ŝi en la ĉivespera konkurso. Aliokaze mi ne alestus pro manko de partnero.” Li Ĵetis rigardon al Amelia. “Ŝi ludas pli lerte ol mi, malgraŭ ke mi aniĝis al la klubo antaŭ pli ol jardeko. Kaj pro tio, ke tiu ĉi ludado neniiĝis, ni jam interkonsentis partneri en la proksima Ĵaŭdo.” Li momente turnis la rigardon al la starvico antaŭ la policanino. “Amelia jam havas miajn adreson kaj telefonnumeron. Ĉu mi devas atendi ...?”

La policisto interrompis lin. “Tute ne!”

“Dankon! Do mi foriros!” Li riverencis kaj sin direktis al la pordo.

Al Roberto Elis lia edzino demandis, “Kion diris al vi Vinifreda Hagen? Ĉu vi jam havas suspekton pri la identeco de la kulpulo? Ĉu estas pro tio, ke vi decidis ne daŭrigi la demandadon?”

Li malrapide kapneis. “Mi decidis, ke mi ne sukcesos eltiri pli da informo ĉivespere. Kaj estus antaŭtempe kompili liston de suspektatoj. Ni eĉ ankoraŭ ne havas konfirmon, ke profesoro Inglis ja mortis pro venenado.” Li rigardis ŝin scivole. “Vi nenion kontribuis dum la kolektiva demandado. Ĉu estas io, kion vi preferas diri al mi private?”

Estis ŝia vico skui la kapon. “Mi bedaŭras, ke ne! Je la kruca momento mi konversaciantis kun doktoro Skolnik, kaj mi eĉ ne vidis la falon de la profesoro.”

“Kie vi estis, kiam ekokazis la disputo pri la seĝo?”

“Ĉe la ekstremo de la trinkaĵa tablo kontraŭa al tiu, kie staris profesoro Inglis.”

“Ĉu vi memoras, kiu alia apudestis la tablon ĉirkaŭ la koncerna tempo?”

“Mi pensu! Certe Vinifreda Hagen kaj Lucia Avakian. Kaj” Ŝi momente fermis la okulojn. Ŝia edzo dume elprenis sian libreton kaj faris noton. “Jes!” ŝi daŭrigis. “Ĉeestis tie ankaŭ grafino Ĉarlota Mikaeli kaj fraŭlino Hilda Davenport. Mi subaŭdis Ĉarlotan proponi al Hilda, ke ili formu duopon por la konkurso venontan ĵaŭdon. Hilda respondis, ke ŝi jam havas partneron.”

“Ĉu iu cetera?”

Ŝi sulkis la frunton. “Mi pensas, ke unu persono. Jes! Doktorino Diana Simkin. Ŝi lektoras pri matematiko, same kiel Hilda Davenport.”

“Hm!” Roberto iom plu skribis, antaŭ ol ŝanĝi la temon. “Kion vi scias pri la personaj rilatoj de profesoro Inglis? Ĉu li havis malamikojn?”

“Nu, mi mem malŝatis lin. Mi trovis lin – kiel diri? – ŝmireca. Tamen ŝajnas, ke ne samopiniis aliaj.”

“Aparte la virinoj, ĉu ne?”

Ŝi levis la ŝultrojn. “Nu, jes! Se oni povas kredi al la klaĉado, li estis

virinumema. Sed pri tio mi kompreneble ne havas rektan scion.”

La detektivo turnis sian rigardon al la trinkaĵa tablo. Jam malaperis la lastaj el la klubanoj, kaj la policanino atendis tie kun notlibro en la mano. La kaftaso de la mortinto staris sur la tablo apud ŝi.

“Mi devas foriri,” Elis diris al sia edzino. “Mi kunprenos tiun tason kaj lasos ĝin kun respondeculo ĉe la malsanulejo. Mi esperas, ke la laboratoristoj faros analizon morgaŭ. Kaj unue mi devas veturigi mian kolegon al la policejo. Mi antaŭvidas, ke mi alvenos hejmen post duono de horo, aŭ eble iom pli.”

“Bone! Ĝis tiam!” Ŝi prenis sian mansaketon de sur seĝo kaj eliris.

Baldaŭ sekvis la detektivo kaj lia koleginino.

4. DISKUTADO ĈE PETRO TOMSON

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro.

5. ONIDIROJ

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro.

6. LA JUNA HEMIISTINO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro.

7. LA VIDVINO PAROLAS

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro.

8. LA ENKETOKAMPO ŜANGĜAS

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro.

9. INUNDO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro.

10. KRUCA PETO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro.

11. LA JĀŪDA BRIGŌKUNVENO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro.

12. KIES TASO?

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro.

13. LA MATEMATIKISTINO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro.

14. FESTA VESPERMANÔ

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro.

15. LA SUSPEKTATO REVENAS

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro.

16. CÊ LA FREŜA FARO

Tiu cî capitro aperas nur en la plena versio de la libro.

17. LA ELEKTADO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la libro.

De la sama aŭtoro ĉe la sama eldonejo aperis:

Septaga murdenigmo (1991)

Kolera afero (1993)

Morto de sciencisto (1994)

Mortiga ekskurso (2006)

Kolofono

Titolo: Briĝo kun veneno

Aŭtoro: Ronald Cecil Gates

Kovrilo: Ferriol Macip i Bonet

ISBN de la papera eldono: 978 9077066 51 5

UDK: 82.3.892

NUR: 331

Leĝa depono de la papera eldono: D/2014/2924/2

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekensstraat 169 - 2060 Antwerpen

www.retbutiko.be

© 2014 FEL, Antverpeno